# *Raúl kaj Díaz Canel en la lasta sesitago de la Nacia Asembleo*



**Foto: PL**

Havano, dec 20 (RHK) La gvidanto de la Kuba Revolucio, Raúl Castro, kaj la Prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, partoprenas hodia? en la fermtago de la Tria Periodo de Sesioj de la Nacia Asembleo de la Popola Povo (Parlamento).

?i-vendrede finas la debatoj pri la ?efaj problemoj de la lando, traktitaj pasintaj lundo kaj mardo en kunvenoj de la Konstantaj Komisionoj, kaj ekde merkredo en plenaj kunsidoj.

Kunvenitaj en la Kongresa Palaco de ?i tiu ?efurbo, la kubaj deputitoj debatos cele aprobi la projekton de Le?o pri Praktiko de Juro kaj la Nacia Organizo de Kolektivaj Advokatfirmaoj.

Same, la tagordo inkluzivas ?isdatigon de la Le?dona Tagordo por 2025; la ratifo de Dekreto-Le?oj kaj Interkonsentoj de la ?tata Konsilio, kaj la aprobo de la institucio submetota al altranga inspektado, por kiu la Ministerio de Transportado estas proponita.

Aliflanke, ili determinos la teritorion kaj la organizon, kiuj en julio de la venonta jaro raportos al la Parlamento pri sia administrado, respondeco kiuj povus respondi respektive al la provinco Camagüey kaj al la Nacia Instituto pri Sporto, Fizika Edukado kaj Distro.

Anta?tage ili analizis kiel progresas la efektivigo de la ampleksa prizorga politiko por infanoj, adoleskantoj kaj junuloj, kaj ricevis informojn pri la reakiro de la okcidenta provinco Artemisa, post la efiko de la uragano Rafael.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/372486-raul-kaj-diaz-canel-en-la-lasta-sesitago-de-la-nacia-asembleo

**Radio Habana Cuba**